


Hans Jankowski

# Esperanto-mono

**La Akademio de Esperanto en 1908**




**René de SAUSSURE**

(1868 - 1943)

*Karikaturo el "Spritulo" post establo de la Ĉekbanko Esperantista en jaro 1908*

Hans Jankowski

# Esperanto-mono

Ilustrita historio pri universala monosistemo

Dua kaj kompletigita eldono

2000

UDK 336 (091)
Ja 379

## Literaturaj fontoj

Internacia Scienca Revuo:
"Projekto pri internacia mono" (majo 1907)
"Pri internacia helpa mono" (decembro 1907)
La Monnaie Internationale (1914)
de René de Saussure
Internacia Helpa Monsistemo
de P.Corret
Historio de "Spesmilo"
de A.Holzhaus
Internaciaj transpagiloj
de William Harmon
El historio de la esperantista monunuo
de D-ro Josef Hartl
Die Esperanto-Währung
de D-ro H.Ungar el "Der Weltspiegel", Jan. 1932
Kommt Esperanto-Geld?
de K. Fr. Frentzel
Enciklopedio de Esperanto
(Eldono 1933)
La Praktiko
de julio - aŭgusto 1960
La Verda Lupeo
informilo de ELF-AREK

---

Redaktis kaj kompostis Petras Čeliauskas
Presis tipografio "Aušra" en Kaunas, Litovio
Eldonkvanto 500 ekz.

Leido ir spausdino SPAB spaustuvė „Aušra", 2000 - 2325

ISBN 9986-941-49-0
© „Aušra", 2000

# ENHAVO


Antaŭparolo ........ 4
Internacia Helpa Mono - la spesmilosistemo ........ 5
Internacia Helpa Mono ........ 7
La Ĉekbanko Esperantista ........ 8
Universala Spesmila Banko ........ 12
La Steloj de la Universala Ligo ........ 13
Moneroj memorigaj pri Esperanto kaj Zamenhof
  Pollando ........ 17
  Kubo ........ 17
  Kroatio ........ 18
Esperantistoj sur ŝtataj moneroj kaj bankbiletoj
  Aŭstrio ........ 18
  Ĉeĥoslovakio ........ 19
  Japanio ........ 19
  Jugoslavio ........ 19
  Sovetunio ........ 20
  Svislando ........ 20
Valormarkoj, kreditbiletoj kaj donacokuponoj de Esperanto-Asocioj kaj Esperanto-grupoj
  Eldonoj de Universala Esperanto-Asocio ........ 21
  Esperantistaj Respondkuponoj ........ 22
  Donaca karto ........ 23
  Cooperativa La Libera Popolo ........ 23
  Kreditbileto de la Laborista E-grupo Düsseldorf ........ 24
  Kreditbileto de Societo “Esperanto” en Zittau ........ 24
  Svedio ........ 25
  Esperanto-hotelo en Herzberg ........ 25
Diversaj biletoj, markoj kaj brikoj ........ 26
  Pollando ........ 27
  IKUE-KELI ........ 27
  Bulgario ........ 28
  Aliaj eldonoj ........ 28
  Fantaziaĵoj ........ 28
  Monoŝanĝaj aŭtomatoj ........ 30
Mallongaj biografioj de esperantistoj ........ 31
Resumo ........ 32

# Antaŭparolo

Ĉi tiu broŝuro memorigu pri la klopodoj de esperantistoj krei universalan monosistemon kaj estas dediĉata al la pioniroj de Esperanto-mono:

| | |
|---|---|
| René de Saussure | 1868 - 1943 |
| Herbert F. Höveler | 1859 - 1918 |
| Dreves Uitterdijk | 1866 - 1940 |
| Andreo Cseh | 1895 - 1979 |

La klopodoj krei universalan monosistemon por la esperantistoj jam komenciĝis apenaŭ 20 jarojn post la apero de la Internacia Lingvo ESPERANTO kaj celis plifaciligi komercajn kaj interŝanĝajn rilatojn inter esperantistoj de diversaj landoj.

Krizoj en monosistemoj de la nuna tempo kaj tre altaj kostoj de monoĝiroj al eksterlandoj, ĉu per poŝto aŭ per bankoj, montras, ke la temo restas aktuala kiel antaŭ 90 jaroj.

Krome, en ĉi tiu broŝuro mi atentigas pri mono memoriga al Esperanto kaj esperantistoj, pri monoeldonoj de Esperanto-grupoj kaj fantaziaj monokreaĵoj de esperantistoj.

Mi kore dankas samideanojn Albert F.Stephan, Karl-Heinz Kersting, Alfred Conzeth kaj Petras Čeliauskas, kiuj kunhelpis realigi ĉi tiun libreton.

La aŭtoro permesas partajn represojn aŭ kopiojn el ĉi tiu kajero.

La jaro 2000 La aŭtoro

# Internacia Helpa Mono - la spesmilosistemo

Pli ol cent jaroj pasis de post la kreo de nia lingvo Esperanto, per kiu ĝia iniciatinto Ludoviko L.Zamenhof celis plifaciligi la rilatojn inter homoj de malsamaj popoloj kaj eduki ilin al paca harmonia kunvivado. Apenaŭ 20 jaroj post la apero de Esperanto inter esperantistoj kreskis la deziro havi internacian monosistemon por plifaciligi komercajn kaj interŝanĝajn rilatojn inter esperantistoj en la tuta mondo kaj ankaŭ por allogi komercistojn ekkoni la favorojn, kiujn donas universalaj lingvo kaj valuto.

La unua, kiu prezentis projekton pri internacia monosistemo, estis la svisa esperantisto prof. René de Saussure. Kiam dum la jaro 1906 li legis Esperanto-gazetojn el diversaj landoj, lin ĝenis, ke la abonprezoj de la gazetoj estis notitaj en diversaj naciaj valutoj. Tio instigis lin elpensi internacian helpan monosistemon kaj prezenti ĝin al la Franca Asocio por Progresigo de Scienco kaj publikigi ĝin en la Internacia Scienca Revuo, majo de 1907.

Laŭ la ideo de prof. de Saussure la nova monosistemo estu bazata sur la uzado de la internacia lingvo Esperanto kaj ne bezonus ekzisti materie. (Ne devus ekzisti moneroj aŭ bankbiletoj). Sufiĉus la ekzisto de imaga internacia monunuo, kiu ebligus oportunan tradukon de la valoro de naciaj monunuoj kaj, kiel celo de fora estonteco, tiu internacia monosistemo anstataŭu la naciajn, same kiel dum la 19a jarcento multaj lokaj monosistemoj malaperis favore al naciaj, kaj lokajn mezurosistemojn anstataŭis la metra mezurosistemo.

Multaj nomoj estis proponitaj por la nova monunuo: Zamilo kaj Zao memore al Zamenhof, Aŭro kaj Goldo por ora monero, Argo aŭ Silvro por arĝenta monero, Niklo, Rundo, Stelo, Bronzo kaj Kupro por malgrandvaloraj moneroj. Fine prof. de Saussure elektis monosistemon, kiu tiutempe jam ekzistis en Portugalio kaj Brazilo. Al la baza monunuo li donis la nomon ***Speso*** (de peco).

En Francio, Belgio kaj Svislando la plej malgranda monero estis centono de franko, Laŭ la nova monosistemo la Speso havis valoron nur de kvarcentono de franko. Tia etvalora monero ne ekzistis en Eŭropo. Prof. de Saussure volis enkonduki tian preskaŭ senvaloran bazan monunuon, por ke oni facile kaj precize povu transkalkuli la valoron de naciaj valutoj sen uzo de decimalaj ciferoj. En la proponita monosistemo kiel baza unuo estis ***Speso*** kaj por la praktika uzado ***Spesmilo***.

***1 spesmilo (Sm) = 1000 spesoj (S) = 100 spesdekoj (Sd) = 10 spescentoj (Sc)***


*Signo de spesmilo*

Kiel multaj valutoj tiutempe, ankaŭ la spesmilo estis ligita al la oro. Por la valoro de 10 spesmiloj prof. de Saussure elektis 8 g da oro laŭ proporcio de $^{11}/_{12}$ oro kaj $^{1}/_{12}$ kupro (=7,333 g da pura oro). Tiu orokvanto estis tre proksima al tiu de brita oropundo (7,322 g da pura oro) aŭ de 25 orofrankoj (7,258 g da pura oro) aŭ de 20 germanaj oromarkoj (7,168 g da pura oro).

En aŭgusto 1907 la kongreso de la Franca Asocio por Progresigo de Scienco rekomendis al la Esperanto-Asocioj la kreon de universala pagilo, ĉar "universala pagosistemo necesas pli kaj pli kaj povas esti tre utila".

**Tabelo de naciaj monunuoj**
**kune kun ilia internacia valoro en "spesoj"**
(ora fundamento)

10 Spesmiloj egalvaloras ormoneron da 8 gramoj, laŭ proporcio 11/12.
1 Sm (spesmilo) = 100 Sd (spesdekoj) = 1000 S (spesoj).

| | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|
| Argentino | 1 peso | = 100 centavos | = 2,019 Sm | 1 Sm | = 0,505 pesos |
| Austrio-Hungario | 1 krono | = 100 heller | = 0,416 „ | 1 „ | = 2,40 kronoj |
| Bolivio | 1 boliviano | = 100 centavos | = 0,851 „ | 1 „ | = 1,174 boliviano |
| Brazilo | 1 milreis | = 1000 reis | = 1,121 „ | 1 „ | = 0,892 milreis |
| Ĉilo | 1 peso | = 100 centavos | = 1,436 „ | 1 „ | = 0,676 pesos |
| Egiptio | 1 Eg. shilling | = 5 piastroj T. | = 0,510 „ | 1 „ | = 1,955 Eg. shilling |
| Francio | 1 franc | = 100 centimes | = 0,396 „ | 1 „ | = 2,525 francs |
| Germanio | 1 marko | = 100 pfenigoj | = 0,487 „ | 1 „ | = 2,048 markoj |
| Britio | 1 shilling | = 12 pence | = 0,498 „ | 1 „ | = 2,003 shilling |
| Hindio | 1 rupee | = 16 annas | = 0,970 „ | 1 „ | = 1,031 rupee |
| Japanio | 1 yen | = 100 sen | = 1,010 „ | 1 „ | = 0,978 yen |
| Meksiko | 1 peso | = 100 centavos | = 1,029 „ | 1 „ | = 0,495 pesos |
| Nederlando | 1 gulden | = 100 cents | = 0,827 „ | 1 „ | = 1,21 gulden |
| Portugalio | 1 milreis | = 1000 reis | = 2,019 „ | 1 „ | = 0,451 milreis |
| Svedio | 1 kron | = 100 öre | = 0,546 „ | 1 „ | = 1,82 kron |
| Turkio | 10 piastres | = 400 para | = 0,924 „ | 1 „ | = 10,982 piastres |
| Usono | 1 dollar | = 100 cents | = 2,052 „ | 1 „ | = 0,482 dollars |
| Venezuelo | 1 bolivar | = 100 centavos | = 0,396 „ | 1 „ | = 2,525 bolivar. |

Belgio, Bulgario, Grekio, Italio, Rumanio, Serbio, Svisio same kiel Francio; Danio, Norvegio same kiel Svedio; Aŭstralio same kiel Britio; Kanado same kiel Usono.

*Tabelo de valoroj prenita el Scienca Revuo, majo 1907*

Post la publikigo de la projekto pri "Internacia Helpa Mono" prof. de Saussure ricevis grandan kvanton da leteroj de esperantistoj, kiuj plej grandparte aprobis la ideon kaj sistemon proponitan. Inter la aprobantoj estis ankaŭ d-ro Zamenhof, kies letero estis publikigita en la "Internacia Scienca Revuo", decembra numero de 1907.

## *Letero de D-ro Zamenhof*

*Vian artikolon pri la internacia monunuo, mi legis kun granda intereso kaj ĝi tre plaĉis al mi...*

*Vian ideon mi ne sole **aprobas**, sed mi tre petas vin ke vi neniam ĝin forlasu kaj ke vi nepre faru ĉion, kion vi povas, por ricevi por ĝi la sankcion de la Kembriĝa Kongreso.*

*Ĉiu Esperantisto povas havi sian lingvon, siajn gentajn morojn kaj festojn, sian nacian monan sistemon, k.t.p., sed por ĉiuj rilatoj **intergentaj** kaj **internaciaj** devas ekzisti fundamento **neŭtrala**. La ellaborado de tia neŭtrala fundamento, laŭ mia opinio, devas esti la ĉefa celo de la kongresoj Esperantistaj. Por ĉiu **privata** Esperantisto estas deviga nur la Deklaracio Bulonja; sed en la **Kongresoj** Esperantistaj oni devas memori ankaŭ pri la interna ideo de la Esperantismo...*

*Ne forjetu vian ideon ĉar pli aŭ malpli frue ĝi nepre venkos...*

*D-ro L.L.Zamenhof*

## Internacia Helpa Mono

Fine de 1907 prof. Bord el Dijon, Francio, kaj D-ro Tellini el Bologna, Italio, interkonsentis krei "Internacian Helpan Monon". Por faciligi la transsendon de malgrandaj monosumoj ili vendis valormarkojn en valoro de 2 spesdekoj aŭ 5 centonoj de franko aŭ liro kaj akceptis tiujn valormarkojn je sama valoro.




*La valormarko de 2 spesdekoj (iomete pligrandigita)*

La valormarkoj estis presitaj en diversaj koloroj kaj estis dentumitaj. Ili montras Esperanto-flagon sur terglobo kaj havas surskribon "PER KAJ POR ESPERANTO 1907 – INTERNACIA HELPA MONO – 2 SPESDEKOJ – 5 CENTIMOJ".

La markoj havas mezuron 38 x 32 mm kaj estas konataj en jenaj koloroj: blua, bruna, flava, griza, ora, ruĝa, verda, viola, krome ekzistas markoj sen dentumo, presitaj en nigra koloro sur maldika flava papero.

Bedaŭrinde la vendo de tiuj valormarkoj devis baldaŭ ĉesi, ĉar la eldono estis kontraŭleĝa. Poste la valormarkoj estis donitaj al Universala Esperanto-Asocio (fondita en 1908). Kun surpreso U.E.A. ili estis venditaj kiel glumarkoj aŭ sigelilaj markoj (la aŭtoro de ĉi tiu broŝuro posedas leteron kun tiaj valormarkoj senditan en 1909).

# La Ĉekbanko Esperantista

Estis Herbert F.Höveler (pseŭdonimo E.Ĉefeĉ), verkisto de fame konataj Esperanto-ŝlosiloj, kiu post la apero de la spesmila monosistemo pensis pri ĝia praktika aplikado en la bankservo. En septembro 1908 li fondis en Londono la Ĉekbankon Esperantistan. (Laŭ Enciklopedio de Esperanto la fondo de la banko okazis jam en 1907, sed vidu sube la anoncon de la ĉekbanko).

## Ĉekbanko Esperantista.

Por ekprovadi la praktikecon kaj praktikeblon de ĉekoj esperantistaj antaŭ ol definitive decidi pri la aranĝo de banko esperantista kaj ĝia funkciado nia fervora samideano Cefeć starigis en septembro 1908 provizore regularon kaj malfermis kelkajn kontojn. Post kvinmonata ekprovada tempo, la esperantista ĉekbanko kaj ĝia funkciado estas nun **definitive** pridecidita kaj praktikeble aranĝita. La nova regularo jus aperis. La ĉekbanko celas unue la faciligon de la pagoj inter la diversnaciaj esperantistoj kaj komercistoj, kaj due, prepari la vojon por la ĝenerala akcepto kaj enkonduko de internacia monunuo. Por ke la banko utilu al la esperantistaro estas necese, ke oni povu pagi per ĉeko eĉ la plej malgrandajn sumojn, kiel ekzemple la abonon de iu gazeto, la koston de instruiloj, propagandiloj, k. t. p., kaj ke la ĉefaj librovendistoj, eldonistoj, asocioj, k. t. p. akceptu la esperantistajn ĉekojn en pago por siaj kalkuloj. La ĉekbanko esperantista baldaŭ publikigos la nomaron de la konthavantoj, firmoj kaj privatuloj, kiuj akceptas esperantistajn ĉekojn. Kiu havas intereson por tiaj ĉekoj, skribu al: „Cekbanko Esperantista, Merton Abbey, London, S. W."

La Ĉekbanko Esperantista celis faciligi pagojn inter diversnaciaj esperantistoj kaj prepari la vojon por ĝenerala akcepto kaj enkonduko de internacia monunuo. Sur la ĉekformularoj ĉiuj pagendaj sumoj estas en spesmiloj (1 spesmilo egalvalora al 2,0031 britaj ŝilingoj). Kontoposedantoj pagis 1,500 spesmilojn por la libro de 25 ĉekformularoj kaj por libro de 50 transpagiloj. Tiu sumo kovris la kostojn de presado kaj impostosigelo de 1 penco (= 42 spesoj) por ĉiu ĉeko. La ĉekoj estis realigeblaj ĉe ĉiu banko en la mondo. Transpagiloj estis realigeblaj nur inter kontoposedantoj en la ĉekbanko kaj ne bezonis impostan sigelon. Por kontoposedantoj la minimuma depono estis 10 spesmiloj. (La bildo ĉi-sube)







*Ĉekformularo kun teksto en Esperanto kaj angla lingvo. Originala formularo estas 220 § 90 mm.*



KONTULO.

No. 36700

Dato

Al

Sm.

ĈEKBANKO ESPERANTISTA

UNION POSTALE UNIVERSELLE.

POŜTA KARTO.

ПОЧТОВАЯ КАРТОЧКА.

Postkarte. Cartolina Postale. Carte Postale. Tarjeta Postal. Levelezö-Lap. Bilhete Postal. Brefkort. Dopisnice. Briefkaart. Postkaart. Post Card. Cartă Postală. Pocztówka. Tiskopis.

POŜTA MARKO.

Al



La Ĉekbanko Esperantista, Merton Abbey, London, S.W.

No. 4998

Urbo

Dato


Bonvolu transpagi el ......la Kredito en la Konton de ......

la Sumon de ...... Spesmilo ......

kaj metu ĝin en ......ian ŝuldon.

Subskribo:

Sciigoj:



POSTKARTE. CARTOLINA POSTALE. CARTE POSTALE. TARJETA POSTAL.

UNION POSTALE UNIVERSELLE.

POŜTA KARTO

DOPISNICE.

LEVELEZŐ-LAP. BILHETE POSTAL. BREFKORT. POST CARD.

BRIEFKAART. — ОТКРЫТОЕ ПИСЬМО. — POSTKAART.

CARTĂ POSTALĂ. — POCZTÓWKA. — TISKOPIS.

POŜTA MARKO

Al


Ekzistas diversaj transpagiloj de la Ĉekbanko Esperantista. Estis la transpagilo en formo de poŝta karto: la teksto estis presita en blua koloro; la subpreso en la meza parto kaj la teksto sur la dorsa flanko estas en flava koloro (la bildo ĉi-supre).

La Ĉekbanko Esperantista havis tujan sukceson kaj funkciis kun kunlaborantaj bankoj: London & South Western Bank, Ltd. Merton Abbey, London, S.W. (Britio); Bankhaus Gebrüder Arnold en Dresden (Germanio) kaj Banko A.Saĥarov, Tverskaja, Moskvo (Rusio).

*Alia transpagilo en formo de poŝtkarto. Mezuroj: 200 x 90 mm. Teksto presita en nigra koloro sur verda kartono. Dekstre - la fronta kaj dorsa paĝoj.*

Esperanto-Asocioj el diversaj landoj, multaj eldonistoj kaj vendistoj de Esperantaj libroj, la Ĉambro de Komerco en Washington (Usono) kaj ankaŭ la fama vojaĝagentejo Thomas Cook & Son en Londono havis kontojn ĉe la Ĉekbanko Esperantista.

La Ĉekbanko Esperantista eldonis ankaŭ malgrandajn valormarkojn kaj intencis vendi ilin al kontoposedantoj, por ke malgrandaj monsumoj povus esti facile pagataj. Laŭ artikolo de prof. Tarnov en la "Germana Esperantisto" de marto 1913 vendado de tiuj valormarkoj estis malpermesita.




La valormarkoj estas dentumitaj kaj mezuras nur 24 x 20 mm. Ekzistas jenaj valoroj: 25, 50, 75, 100, 200, 300, 400, 500 spesoj, presitaj en verda koloro. Spesmil-valoroj ekzistas en koloroj ruĝa por 1000, blua por 2000, bruna por 3000, flava por 5000. Krome sur ĉiu valormarko estas surpresita la valoro en nigra koloro. La valormarkoj montras kolombon kun branĉo super la vorto ESPERANTO, la du mondpartojn kaj surskribon: UNU MONDO, UNU MONO, UNU LINGVO, kaj ambaŭflanke – ĈEKBANKO ESPERANTISTA.



En 1908 ankaŭ la Esperanta Konsulejo en Ĝenevo (Svislando), la Schweizer Bankverein (Svisa banksocieto) kaj la Banque E.Pictet en Ĝenevo enkondukis eksperimente spesmiloĉekojn, kies teksto estis en Esperanto (la bildo apude).

Ekde jaro 1908 librokatalogoj, membrokotizoj de Esperanto-asocioj, abonoj de gazetoj, vendoprezoj sur bildkartoj kaj dum Esperanto-kongresoj, eĉ manĝokuponoj en restoracioj indikis la prezojn en spesmiloj.

Okaze de la 25-jara ekzisto de Esperanto en la jaro 1912 la svisa medalofarejo **Holy Freres** stampis arĝentajn monerojn de 1 kaj 2 spesmiloj. Dum la Universalaj Kongresoj en Krakovo 1912 kaj en Berno 1913 ili estis vendataj kiel memorajoj.

La antaŭa parto de la moneroj montras skribon JUBILEO DE ESPERANTO 1887 – 1912; en la mezo estas blazonŝildo kun stelo kaj flamoj el la blazonŝildo. Sur la dorsaj partoj estas busto de Zamenhof kaj ĉirkaŭa skribo: D-ro L.L.ZAMENHOF AŬTORO DE ESPERANTO.

La moneroj estas el $^{11}/_{12}$ arĝento kaj $^{1}/_{12}$ kupro; iliaj mezuroj:




*Moneroj eldonitaj en 1912*

1 spesmilo – ∅ 30 mm, pezo 11 g,
2 spesmiloj – ∅ 36 mm, pezo 22 g.

En la jaro 1907 je publikigo de la spesmila monosistemo profesoro René de Saussure skribis, ke la internacia helpa mono ne bezonus ekzisti materie. En la broŝuro "La monnaie international" (eldonita 1914) li skribis: "Ne restas pli ol deziri, ke la uzado de spesmilo pli kaj pli disvastiĝos, kaj la komercistoj alkutimiĝos al internacia mono en atendo, ke la stampado de internacia oromonero de 10 spesmiloj ĉie havos akcepton".

En aprilo 1914 jam 730 personoj kaj asocioj en 320 urboj kaj 43 landoj havis kontojn ĉe la Ĉekbanko Esperantista. Ĝi vendis 20 000 ĉekformularojn kaj 40 000 transpagilojn.

La Unua Mondmilito (1914-1918) dividis la popolojn de Eŭropo kaj sufokis la agadon de la Ĉekbanko Esperantista kaj repuŝis la evoluon de Esperanto en militantaj ŝtatoj. La Ĉekbanko Esperantista estis likvidita post la morto (1918.09.01) de ĝia fondinto Herbert F.Höveler.




*Medalofarejo produktinta la monerojn*

Dum kelkaj jaroj la kontoposedantoj de la Ĉekbanko Esperantista ĝuis eblecon povi pagi internacie kaj elkonti monon sen kurza perdo kaj kostoj de la ĝirado. Dum la Unua Mondmilito oromoneroj ĉesis cirkuli kaj la ora garantia bazo de valutoj estis abolita en ĉiuj ŝtatoj de Eŭropo. Post la milito en multaj ŝtatoj sekvis inflacio.

En Nederlando, unu el la malmultaj ŝtatoj, kies valuto restis stabila dum tiu periodo, tiutempe jam maljuna, sed tre aktiva pioniro de Esperanto-movado en Nederlando, Dreves Uitterdijk provis revivigi la spesmilan monosistemon. En la jaro 1927, 40 jaroj post publikigo de Esperanto kaj 20 jaroj post akcepto de la spesmila sistemo, Dreves Uitterdijk kaj J.Hengel fondis bankon, kies nomo estis Universala Spesmila Banko.

## Universala Spesmila Banko

La Universala Spesmila Banko kun sidejo en Laren (Nederlando) eldonis monbiletojn en valoro de $^{1}/_{2}$, 1, 2, 5 kaj 10 spesmiloj.







*Ambaŭ flankoj de monbileto de Universala Spesmila Banko (malgrandigita). Kolorajn reproduktaĵojn de la biletoj vidu sur la kvara kovrilpaĝo.*

UNIVERSALA SPESMILA BANKO
INTERNACIA OFICEJO
POŜTFAKO 1
LAREN (HOLANDO)
HONOR-PREZIDANTO: RÉNÉ DE SAUSSURE
ELPENSINTO DE LA SPESMILA SISTEMO

SEN KURZPERDO KAJ SENKOSTA PAGO
DE MALGRANDAJ SUMOJ TRA LA TUTA MONDO PER NIAJ
SPESMILAJ VALORBILETOJ KAJ SPESMILAJ VALORMARKOJ

Ĉiu scias, ke 1927 estas la 40-a Jubileo de Esperanto, sed ĉu vi ankaŭ scias ke ĝi estas la 20-jara datreveno de la oficiala akcepto de la Spesmila Sistemo?

La 17-an de Aŭgusto 1907 S-ro Réné de Saussure raportinte pri la kunvenoj de la Scienca Asocio prezentis al la III-a Universala Kongreso la jenan deziron:

„La Kongreso opinias ke la uzado de helpa decimala monsistemo estus tre utila.

Por aliaj landoj kalkulu laŭ la taga borskurzo de la dolaro je la proporcio $ 1.— = SM 2.05.

Pri la kalkulmaniero de la kurzoj, detaloj pri la Spesmila Sistemo el teoria kaj praktika vidpunkto, la biletelmeto kaj ĝia kontrolado, la organizacio de la banko, ĝiaj naciaj oficejoj, filioj kaj agentejoj, la fondota internacia ĝirservo kaj diversaj aliaj detaloj pri la praktika aplikado de la Spesmila Sistemo, vidu nian broŝuron „Internacia Pagilo", akirebla ĉe la Esperantaj libristoj kaj ĉe la Internacia Oficejo de la banko. Prezo afrankita SM 0.20.

Kompletaj kurzaj tabeloj, listoj de societoj kaj firmoj, kiuj akceptas la Valorbiletojn kaj -markojn, listoj de kontuloj, monata transvidtabelo de la banko kaj multaj aliaj aktualaĵoj pri la Internacia Mono aperos en la Monatgazeto „Spesmila Bulteno" mendebla je la samaj adresoj. Jarabono SM 1.—, nur kontraŭ antaŭpago.

Por aĉeti iun ajn sumon en SM sendu la egalvaloron + SM 0.25 por rekomendita afranko poŝtmandate, per bankĉeko aŭ en naciaj monbiletoj.

La originala grandeco de la monbiletoj estas 103 x 73 mm. Sur la frontpaĝoj de la monbiletoj estas malgranda busto de Zamenhof, granda stelo kaj la devizo UNU LINGVO – UNU MONDO – UNU MONO. La seria n-ro AA, la dato (15 Januaro 1927), la valoro kaj subskriboj estas nigre presitaj.

Sur la monbiletoj la preskoloro estas nigra por valorindiko, dato, numerado kaj subskriboj. La aliaj preskoloroj estas: ruĝa por duonspesmilo, (ankoraŭ ne konata, supozeble blua – por unu spesmilo), verda – por du spesmiloj, bruna –

por kvin spesmiloj kaj viola – por dek spesmiloj. Subskriboj estas Dreves Uitterdijk kaj Jan Hengel. Tiuj biletoj ekzistas ankaŭ kun alikolora vertikala surpreso ***Senvalora Specimeno***.

La dorsaj flankoj de la biletoj estas presitaj en sama koloro kiel la frontpaĝoj, sed sen nigra koloro. Ili montras la pacpalacon en Hago, Holando, kaj je la flankoj la surskribon: "Dek spesmiloj egalvaloraj al 8 gramoj da oro laŭ la proporcio de 11 al 12" kaj "Ĉiuj rajtoj rezervitaj – falsado leĝe punota".

La Universala Spesmila Banko laboris ne sukcese kaj post nur kelkaj jaroj ĉesis ekzisti.

## La Steloj de la Universala Ligo

Dum mallumaj tagoj de la Dua Mondmilito (1939-1945) en la jaro 1942 kunvenis esperantistoj en Nederlando kun celo pripensi la malebligon de novaj militoj per kreo de nova socia ordo en la mondo. En 1946 ili fondis la ***Universalan Ligon (UL)*** kun sidejo en Hago. Tiu asocio kun mondfederalistaj ideoj adoptis la devizon: UNU MONDO – UNU LINGVO – UNU MONO. La lingvo kompreneble estis Esperanto kaj la monunuo de UL ricevis la nomon ***stelo*** (1 stelo = 100 pintoj). Teorie la stelo havu la valoron de 1 kilogramo da pano. Ĉar en 1946 kilogramo da pano kostis 0,25 de guldeno en Nederlando, la valoro de 1 stelo estis fiksita al tiu sumo.

Universala Ligo ne restis ĉe nura teoria mono, sed kreis realan pagilon en formo de premiokuponoj. Estis eldonitaj premiokuponoj en valoro de 1 stelo. UL ankaŭ intencis eldoni premiokuponojn en valoro de 5 kaj 10 steloj, sed tio ne okazis. (Sube vi vidas ambaŭ flankojn de premiokupono en valoro de 1 stelo.)




La premiokuponoj mezuras 61 x 48 mm kaj havis limigitan validecon. Unuaj eldonoj validis ĝis fino de 1950. Poste la valideco estis plilongigita per surstampo de aldona jarcifero diverskolora: 1955 (violeta), 1965 (violeta), 1975 (verda), 1980 (violeta) kaj 1985 (ruĝa). La premiokuponoj estis aĉeteblaj en la oficejo de UL kaj ĉe la Internacia Esperanto Instituto (IEI) en Hago. Ili estis uzeblaj por pago de membrokotizoj, abonoj de gazetoj, aĉeto de libroj kaj ankaŭ estis riceveblaj kiel premio por varbado de novaj membroj.

Jam en komenco la estraro de UL planis eldoni metalajn monerojn. Klopodoj por tiu aranĝo komenciĝis fine de 1958. En aŭtuno 1959 la ŝtata Nederlanda monfarejo en Utrecht




akceptis mendon fari stelo-monerojn. Je la 28a de junio 1960 oni stampis la unuajn stelo-monerojn en ĉeesto de la estraro de Universala Ligo. Estis faritaj po 10 000 moneroj de 1, 5 kaj 10 steloj. Sur la frontparto de ĉiu monero estas granda kvinpinta stelo kun valorindiko kaj skribo UNIVERSALA LIGO kaj jarcifero 1959. Dekstre de la stelo estas signo de la monfarejo Utrecht (Merkurio) kaj maldekstre – la signo de la estro de la monfarejo (fiŝeto). La dorsaj partoj de la moneroj montras:

1 stelo – blazonŝildo de UL kaj skribo: UNU MONDO – UNU LINGVO – UNU MONO; ∅ 20 mm, pezo 2 g, metalo - bronzo.

5 steloj – terglobo kun ĉirkaŭa skribo: LA MONDO ESTAS UNU LANDO – LA HOMARO UNU POPOLO; ∅ 23,5 mm, pezo 4 g, metalo - latuno.

10 steloj – busto de Zamenhof kaj ĉirkaŭa skribo: D-ro L.L.ZAMENHOF KREINTO DE ESPERANTO kaj lia vivotempo 1859-1917; ∅ 28 mm, pezo 8,5 g, metalo - kupronikelo.


La valoro de premiokuponoj kaj stelomoneroj estis deponita en la Nutspaarbank en Hago.



*A.A.Molenaar, gravurinta la stelo-monerojn*



*La konstruaĵo de la Nederlanda Ŝtata Monfarejo en Utrecht, kie estis stampitaj la stelo-moneroj de Universala Ligo*



*Estraranoj de Universala Ligo kaj gvidantaj mondfederalistoj observas naskiĝon de la mondmoneroj.*

En la jaro 1965 UL eldonis moneron en valoro de 25 steloj. Ĝi aspektas same kiel la monero de 10 steloj, sed estas pli granda. Tiu monero de 25 steloj havas diametron de 38 mm kaj ekzistas en tri diversaj metaloj kaj diferencaj pezoj (bildoj malsupre):

25 steloj – kupronikelo; pezo 19 g, eldonkvanto 1000 (laŭ IEI kaj diro de pastro Cseh);

25 steloj – 90 % arĝento, 10 % kupro; pezo 25 g, eldonkvanto 5 000. Tiuj arĝentaj moneroj montras la vorton PROOF sub la busto de Zamenhof;

25 steloj – oro 983/1000; pezo 50 g. Nur 10 ekzempleroj estis faritaj.




*La moneroj de 25 steloj*

Ekde la kreo de stelo-monosistemo ĝis 1976, la valoro de stelo estis 0,25 de Nederlanda guldeno aŭ ekvivalento en alia valuto. (En la jaro 1968 tio estis 0,075 de usona dolaro, 0,30 de germana marko, 7 britaj pencoj, 0,35 de franca franko aŭ 2 portugalaj eskudoj.) Pro la kontinua inflacio en ĉiuj Eŭropaj ŝtatoj kaj la daŭra malpliiĝo de la aĉetpovo de la guldeno, al kiu la stelo estis ligita, la estraro de UL en 1976 pripensis doni al la stelo novan valoron kaj efikon. La estraro de UL decidis, ke ekde unua de januaro 1977 la valoro de stelo estu 0,50 de guldeno kaj en estonteco la stelo estu valorstabila kaj ĝia reala valoro apogu sin al la Nederlanda prezindekso. Tio signifas, ke la valoro de la stelo daŭre plialtiĝu kontraŭ guldeno kaj aliaj inflaciaj valutoj. Fine de 1990 la stelo havis valoron de 1 guldeno.

La ideo kaj kreo de valorstabila stelo ne ĉie trovis akcepton kaj komprenon. Esperanto-asocioj rifuzis akcepton de steloj kiel pagilon. Post la morto de Andreo CSEH en 1979 – li estis la moviga forto de UL – la membraro regresis kaj la UL komencis dormeti. Nuntempe la Internacia Esperanto-Instituto en Hago administras la heredaĵon de UL.




*Anoncoj en Esperanta gazetaro atestas pri praktika uzo de spesmilo (Sm) en internaciaj transkalkuloj*

# Moneroj memorigaj pri Esperanto kaj Zamenhof

## Pollando

En serio de memorigaj moneroj pri elstaraj pollandanoj, la registaro de Pollando emisiis ankaŭ monerojn memorigajn pri la kreinto de nia lingvo.

La moneroj havas valorojn de 100 zlotoj kaj diametrojn de 32 mm. La arĝentaj moneroj estas el 62,5 % da arĝento kaj 37,5 % da kupro. Ili pezas 16,5 gramojn; la nikelaj moneroj devas esti malpli pezaj.

La aversoj de la moneroj estas samaspektaj kaj montras aglon, jarciferon 1979, la valoron kaj skribon: POLSKA RZECZPOSPOLITA LUDOWA. La reversaj partoj de la moneroj ekzistas kun du diferencaj bustoj de L.Zamenhof kaj montras lian nomon kaj vivotempon (1859-1917).

**Monero 1**




Busto de L.Zamenhof rigardanta maldekstren. Skizo de Stanislawa Watrobska.

100 zlotoj:

metalo arĝento, eldonkvanto 30 000;

metalo nikelo, eldonkvanto 500.

**Monero 2**




Busto de L.Zamenhof rigardanta nur iom al maldekstro kun la vorto PROBA apud la kolumo. Skizo de Anna Jarnuszkiewicz.

**100 zlotoj:**

metalo arĝento, eldonkvanto 3100;

metalo nikelo, eldonkvanto 500.

Nek la arĝentaj, nek la nikelaj cirkulis en Pollando. Ili estis vendataj prefere al eksterlandaj monerokolektantoj. En la jaro 1980 la prezoj estis 8-15 USD por la arĝentaj moneroj kaj 300-400 USD por la nikelaj moneroj.

## Kubo

Okaze de 75a Universala Kongreso de Esperanto en Havano, en la jaro 1990, la registaro de Kubo eldonis 2 memorigajn monerojn.




La aversoj de la 2 moneroj montras la blazonon de Kubo kaj skribon: REPUBLICA DE CUBA, la valorindikon 5 PESOS, la pezon 16 G. kaj arĝentan purecon AG 0,999.

La reversoj de la moneroj montras la buston de Zamenhof antaŭ terglobo kaj ĉirkaŭan skribon: UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO, HAVANO 1990.




**1 peso:**

metalo kupronikelo, ∅ 30 mm, pezo 11 gramoj, eldonkvanto 6 000;

**5 pesoj:**

metalo arĝento 99,9 %, ∅ 38,2 mm, pezo 16 gramoj, eldonkvanto 6 000.

***Kroatio***




En majo 1997 la juna kroata Esperanto-movado okazigis sian unuan kongreson. La kroata registaro omaĝis tiun eventon per eldono de memorigaj poŝtmarko kaj monero. La monero estis eldonita por ĝenerala cirkulado la 16an de oktobro 1997 kaj havas oficialan valoron de 25 kunaoj. Eldonkvanto 300 000 ekzempleroj. La monero estas dumetala, plurangula kun 12 lateroj, diametro 31-32 mm, estas 2 mm dika kaj pezas 14 gramojn. La ĉirkaŭa ringo estas el kupronikelo kaj la centro kun diametro 18 mm estas el latuno.

Sur la averso estas skribo: REPUBLIKA HRVATSKA 25 KUNA, estas kroata blazono kaj foliobranĉoj.

Sur la ekstera cirklo de la reverso estas skribo: UNUA KONGRESO DE KROATAJ ESPERANTISTOJ. En la interna cirklo: PRVI KONGRES HRVATSKIH ESPERANTISTA 1997. En la centro estas la emblemo de la kongreso.

## Esperantistoj sur ŝtataj moneroj kaj bankbiletoj

***Aŭstrio***




Aŭstra bankbileto de 1000 ŝilingoj (serio 1966) montras buston de Bertha von Suttner. Ŝi estis arda pacbatalantino, verkistino famiĝinta per la romano "For la armilojn" kaj en 1905 honorita per Nobelpremio. Kvankam ŝi ne lernis Esperanton pro sia granda aĝo, ŝi multe subtenis



Esperanton, propagandis por ĝia disvastigo kaj persvadis eminentulojn eklerni ĝin.

Ekde la jaro 2002 la portreto de Bertha von Suttner estos sur novaj aŭstraj moneroj de 2 eŭroj (la bildo dekstre apude).

### Ĉeĥoslovakio

Omaĝe al la centjara datreveno de la naskiĝo de S.K. Neumann en la jaro 1975, la ĉeĥoslovaka registaro eldonis arĝentan moneron.

Valoro 50 kronoj, pezo 13 gramoj, 70 % da arĝento, diametro 31,2 mm. Eldonkvanto: 5000 en brila kvalito kaj 55000 en normala kvalito.



Stanislav Kostka Neumann (1875.06.05 – 1947.06.28) estis elstara esperantisto kaj fama ĉeĥa poeto. En 1902, kiam en Prago estis fondita Esperantista Klubo, li estis elektita en la unuan komitaton de la klubo. Post la Dua Mondmilito li ricevis honoran titolon "Nacia Artisto".

### Japanio




Kurantaj japanaj bankbiletoj montras la buston de Nitobe Inazo. Li vivis en 1862 – 1933, studis ekonomion, estis membro de Japana Imperia Akademio kaj de la Supra Domo de la japana parlamento. Dum la jaroj 1919 – 1926 li estis vicĝenerala sekretario de la Ligo de Nacioj en Ĝenevo kaj en tiu ofico li klopodis enkonduki Esperanton en tiun internacian organizon. Li multe helpis al disvastigo de Esperanto.

### Jugoslavio

Josip Broz Tito, ŝtata prezidento de Jugoslavio, iam eklernis Esperanton. Dum la Dua Mondmilito lia portreto estis sur monbileto de jugoslavaj partizanoj. Dum lia regado 1945 – 1980 lia bildo aperis sur kelkaj oraj kaj arĝentaj moneroj. Post lia morto la Ŝtata Popola Banko en 1985 eldonis bankbileton de 5000 dinaroj kun lia busto.

Ankaŭ la Centrala Banko de la Respubliko de Gvineo (Konakrio) eldonis bankbileton de 500 Sylis kun busto de Tito. (Bildoj sur sekvanta paĝo)







*Bankbiletoj kun bildo de Josip Broz Tito; supre - Jugoslavia, pli malsupre - de la Respubliko de Gvineo.*

## Sovetunio



La fama pioniro de kosmonaŭtiko Konstantin Eduardoviĉ Ciolkovskij estis esperantisto kaj membro de SEU (Sovetrespublikara Esperantista Unio). En la jaro 1987 la sovetunia registaro eldonis memorigan moneron kun lia bildo.

La averso de la monero montras la blazonon de la soveta ŝtato, valoron kaj jarciferon 1987.

Sur la reverso de la monero estas Ciolkovskij sidanta, lia nomo kaj vivojaroj 1857 – 1935. En la fono videblas steletoj kaj raketo.

1 rublo, ∅31 mm, pezo 12,3 gramoj da kupronikelo. Eldonkvanto 4 milionoj.

## Svislando

La sviso Auguste Forel estis kuracisto kaj konata scienculo, psikiatro, esplorinta vivon de formikoj kaj anatomion de homa cerbo. Li vivis de 1848 ĝis 1931 kaj estis fidela membro de Universala Esperanto-Asocio.

En la jaro 1978 la Nacia Banko de Svislando eldonis bankbileton de 1000 svisaj frankoj kun portreto de Auguste Forel.




*Auguste Forel sur la svisa bankbileto de 1000 frankoj*

## Valormarkoj, kreditbiletoj kaj donacokuponoj, uzitaj de Esperanto-Asocioj kaj Esperanto-grupoj

### *Eldonoj de la Universala Esperanto-Asocio*

Jam en unuaj jaroj post fondiĝo en 1918 UEA vendis markojn sen kaj kun valorindiko de 1 kaj 2 spesdekoj.

*Esperantiaj markoj.*

Por doni helpon al sia centra kaso, U. E. A. eldonas Esperantiajn markojn, kiujn niaj reprezentantoj kaj membroj estas tre petataj aĉeti kaj diskonigi. Tiuj markoj valoras 1 Sd. por ekzemplero. Ili estas bele presataj kiel naciaj poŝtmarkoj, kaj estas alglueblaj sur ĉiuj kovertoj, poŝtkartoj, ajnaj korespondaĵoj. Ĉiuj Esperantianoj nepre devas ilin uzi, ĉar ili ne nur liveras profiton al la centra kaso de U. E. A., sed ankaŭ reklamas por nia Asocio. Ni vendas ilin po 1 Sd. por ekzemplero (minimume 10). Rabato da 20 % estas allasata al la Delegitoj, Subdelegitoj kaj Esp. of., kondiĉe ke la mendo superu 200.

Ĉiuj Delegitoj kaj Subdelegitoj, kiuj ricevas korespondaĵojn surgluitajn de Esperantia marko, havas la devon ilin respondi *plej rapide* kaj antaŭ la korespondaĵoj, kiuj ne surhavas tiun markon.







*La supra anonco aperis en la jarlibro 1910 de UEA. Apude - la markoj.*

# Esperantista Respondkupono.

Estas regula plendo de la delegitoj de UEA pri manko de afranko ĉe informpetoj. Dum certa tempo tiuj plendoj amasiĝis tiagrade, ke rezultis eksiĝo de delegitoj nepovintaj pagi tiun elspezon kaj ne volintaj rifuzi informpeton. La kaŭzoj de tiu ĉi manko estas, escepte tiu de simpla ŝparemo flanke de l'informpetinto, la neekzisto de praktika kaj simpla pagilo. La *internacia poŝta respondkupono* havas kelkajn malavantaĝojn: Ne ĝenerala, havebla nur en kelkaj landoj kaj nur en pli granda oficejo, do ne en vilaĝo, cirkulado je limigita tempo, tro alta alpago tiel ke ekzemple tia kupono kostas en Svislando 40 centimojn dume la poŝto nur redonas poŝtmarkon valorantan 30 centimojn, la kosto de 20-grama letero internacie. Malgraŭ ĉi tiuj malhelpoj la respondkupono estis multe uzita ĉe la esperantistaro; ĝi efektive fariĝis pagilo por malgrandaj sumoj, sendebla en la korespondaĵo. Tamen la supre diritaj malavantaĝoj, ne forgesante ankaŭ la oftan mankon de poŝta ŝtampo sen kiu la kupono ne estis ŝanĝebla, kaŭzis, ke post la milito la emo uzi ĝin malpligrandiĝis.




Plia malhelpo estis la valuta diferenco ŝanĝanta, kiu malsimpligis la aferon.

La ripetitaj plendoj pri la manko de afranko devigis nin serĉi eblecon de praktika servo, uzebla de ĉiuj esperantistoj. Regule venis proponoj pri kreo de esperantista pagilo, ĉu en formo de ĉeko, ĉu en formo de bankbileto. Zorge ekzameninte tiun eblecon ni konkludis, ke pro leĝaj kaj aliaj cirkonstancoj nek ĉeko nek bileto estas eblaj. Ĉekoj antaŭvidas krediton ĉe la centro, sekve laboron de librotenado, korespondadon kaj . . . admonadon ĉe okaza nesufiĉo de bonhavo. La spertoj de la estinta ĉekbanko instruis nin pri tio. Rilate bankbiletojn ni ja posedas du pagilojn de malgranda valoro preskaŭ ĉie riceveblajn: Bileto de unu dolaro aŭ svisa kvinfranko. Ni ofte ricevis tiajn el landoj, de kie ni neniam estus supozintaj ricevi ekzemple svisan monbileton. Sed ne temas pri tio.

Restas solvota la problemo de simpla kaj praktika pago de 30, 50 centimoj aŭ de unu franko. Ni informas la esperantistaron, ke UEA eldonis **ESPERANTISTAN RESPONDKUPONON** laŭ suba modelo. Ĝi ne havas la malavantaĝojn de la ordinara kupono, validas dum 3 jaroj, de 1927 ĝis 1929 kaj estas ĉiam reakceptata de UEA ĝis 31 Decembro 1929. Por simpligi la akiron ni aranĝis kajeron, kiu entenas 10 biletojn po 30 centimoj, 6 biletojn po 50 centimoj kaj 3 po unu franko. La biletoj estas numeritaj. La kajero kostas kun sendo al la mendanto 10 svisajn frankojn.*) Estas vendata nur tuta kajero, ne unuopaj kuponoj. Ni konsilas al la Delegitoj, ke ili disponigu respondkuponon al personoj bezonantaj kaj ne povantaj akiri tutan kajeron. La vendoprezo de la unuopaj kuponoj aĉeteblaj nur ĉe Delegito estas 35 centimoj por 30, 55 por 50 centimoj kaj frankoj 1.10 por tiu de 1 franko.

Pri la administrado de tiu ĉi nova servo la Direktoro submetis al la Komisiono de UEA internan regularon, kiun ĝi akceptis dum novembro 1926.

Estu la Esperantista Respondkupono nova helpilo por la plifaciligo de la esperantistaj rilatoj kaj trovu la nova servo de UEA ne nur aprobon, sed ankaŭ vastan uzon ĉe la esperantista publiko, forigante de nun la plendadon de delegitoj pri manko de afranko aŭ pago.


*) Mendojn oni sendu al UEA, 12 Boulevard du Théâtre Genève.

Post la Unua Mondmilito, kiam en multaj ŝtatoj de Eŭropo estis inflacio kaj malfaciligo sendi monon al eksterlandoj, UEA kreis Esperantistajn Respondkuponojn.

La Esperantistaj Respondkuponoj estas presitaj en nigra koloro kun diverskolora subpreso por tri valoroj: 0,30 svisaj frankoj – flavebruna,
0,50 sfr. – blueverda,
1,00 sfr. – ruĝa.

Unuaj Esperantistaj Respondkuponoj montras daton de la 1a de decembro 1926 kun valideco ĝis 31.12.1929. La valida daŭro kelkfoje estis plilongigita ĝis 31.12.1935.

## *Donaca karto*


Al: ..................................................

Tiu ĉi karto atestas, ke mi pagis por vi la sumon de kvin guldenoj (dudek steloj) al:

Universala Esperanto Asocio,
Nieuwe Binnenweg 176,
Rotterdam 2, Nederlando.

La karton vi povas uzi kiel pagilon kun valoro de kvin guldenoj por mendoj de libroj, diskoj, gazetoj k.s. plenumebla ĉe la
LIBROSERVO DE UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

donaca karto

La karto validas ĝis: .................... Donacis:

*La bildo montras ambaŭ flankojn de la Donaca Karto. Sur unu flanko estas pentraĵo, sur la alia - la teksto.*

En la nuna tempo, por ebligi helpon al esperantistoj en nepagipovaj aŭ ekonomie suferantaj landoj, pere de samideanoj en ekonomie riĉaj landoj, UEA vendas **Donacajn Kartojn** en valoro de KVIN GULDENOJ.

La donackartoj estas grandaj 150 x 104 mm, presitaj en nigra, ruĝa kaj ora koloroj, kaj estas akceptataj de UEA por aĉeto de libroj, diskoj, gazetoj kaj similaĵoj ĉe la Libroservo de UEA.

## *Cooperativa LA LIBERA POPOLO*




Ekzistas metala monero de 2 Centimos, uzita de la kooperativo LA LIBERA POPOLO en la kataluna urbo Anglés. La nomo de la kooperativo estas sendube en Esperanto. Supozeble tiu kooperativo estis fondita de esperantistoj aŭ almenaŭ esperantisto kunlaboris.

La monero devus esti uzita en la periodo de 1920 – 1938. Informoj pri la metalo de la monero mankas kaj ne estas sciate, ĉu la kooperativo uzis monerojn kun aliaj valoroj.

## *Kreditbileto de la LABORISTA ESPERANTO-GRUPO DÜSSELDORF*

En la jaro 1922 inflacio en Germanio komencis rapidi. Je la jarfino de 1922 la prezaro estis 50-oble pli alta ol je la fino de 1921. "Laborista Esperanto-grupo Düsseldorf en tiu tempo solvis siajn financajn problemojn per vendoj de kreditbiletoj al siaj membroj.




*Kreditbileto KVINDEK MARKOJ*

Ĉi tiu bileto validis nur interne de la asocio. Post tri monatoj, kalkulante de la tago de eldono, la asocio akceptas ĉi tiun biIeton por repago.

Düsseldorf, la 1. Septembro 1922
Prezidanto (Karl Schmidt)
Kasisto (L.Thies)
Laborista-Esperanto-Grupo Düsseldorf

La originala monobileto estas 130 × 85 mm.


## *Kreditbileto de Societo "Esperanto" en Zittau*




Ankaŭ la Societo "Esperanto" en Zittau en Germanujo vendis kreditbiletojn ne transigeblajn. La biletoj ne estas kun dato kaj supozeble estis vendataj je la fino de 1922.

Teksto: UNU MILON DA GERMANAJ MARKOJ ricevis prunteprene por la garantia fondo la subskribintoj. La sumo estas repagota post la festo aŭ komplete aŭ okaze de deficito kun proporcia malaghio kontraŭ redono de tiu chi kvitanco.

## *Svedio*




En la 1950-aj jaroj la Sveda Esperanto-Asocio varbis por eklerni Esperanton per valorbiletoj de Kvin KRONOJ akceptataj en tiu valoro, se oni mendas korespondan kurson de Esperanto kaj pagas 15 kronojn al la poŝtĝiro de la asocio.

## *Esperanto-hotelo en Herzberg*




Laŭ informo en "Heroldo de Esperanto" dum la UEA-kongreso en Brajtono 1989 oni lanĉis projekton por funkciigi Esperanto - hotelon en la montara ragiono de Harco en Centra Germanio.

Por financi tiun projekton oni vendis akcietojn en valoro de 10 + 2 germanaj markoj. La akcietojn eldonis la Esperanto-Societo en la urbo Herzberg (Sud-Harco).

La proprieta kompanio estas registrita en Usono.

Informoj el Heroldo de Esperanto, 1989, n-ro 3.

# Diversaj biletoj, markoj kaj brikoj

Sekvantaj biletoj, markoj kaj brikoj ne havis iun realan monovaloron, sed estas kotizmarkoj, kvitancoj pri donacoj (brikoj) aŭ subvencioj, ĉiuj kun indiko de iu valoro.




En la "Germana Esperantisto" de 20a de marto 1913 profesoro P.Tarnov raportis pri valormarkoj de Esperanto-asocioj, kiuj aaperis antaŭ 1913.

**GEA** (Germana Esperanto-Asocio)

Valormarko de 10 pfenigoj; ilustraĵo mankas.

**GLEA** (Germana Laborista Esperanto-Asocio)

Valormarko de 30 pfenigoj kiel "Aliĝmono". (Bildo apude).




Supozeble post la Unua Mondmilito (1914-1918) G.L.E.A. vendis markojn kun valoro de 25 kaj 50 pfenigoj kaj 1 marko por la ESPERANTO-PROPAGANDO-FONDAĴO.

Unu marko, presita en verda koloro. (Bildo apude malsupre).

**IKUE** (Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista)

Antaŭ 1913 aperis valormarko de 2 pfenigoj. Ilustraĵo mankas.

En Aŭstrio antaŭ 1914 la Prantners Verlag en Graz I vendis propagandomarkojn kun busto de Zamenhof kaj skribo: INTERNACIA LINGVO – ESPERANTO – NIA MAJSTRO Dro. ZAMENHOF.

La markoj havas perforacion kaj formaton de 27 x 31 mm. Ekzistas 4 valoroj presitaj en diferencaj koloroj:

2 heleroj – ruĝa;
3 heleroj – verda kaj nigra;
5 heleroj – blua;
10 heleroj – bruna.

La eldonejo Prantners promesis doni la profiton el la vendo de tiuj markoj por la disvastigo de Esperanto.



La eldonejo L.Kaplan en Wolkowysk, Rusujo, eldonis antaŭ 1914 verdkoloran markon kun formato 34 x 54 mm kaj kun perforacio en nominalo de 1 SPESDEKO (1 kopeko). La marko varbas por **Tutmonda Junulo-Asocio** kaj en sep lingvoj por la lerno de Esperanto. (Bildo malsupre maldekstre).







SUBVENCIAJN KUPONOJN en valoro de 0,50 svisaj frankoj (bildo supre dekstre) vendis ankoraŭ en la jaro 1927 la Loka Kongresa Komitato en Vieno pro forigo de la deficito, kiun kaŭzis la 16a UEA-kongreso, okazinta en Vieno en jaro 1924.

## ***Pollando***

Briko por monumento al Zamenhof en lia naskiĝurbo Bjalistoko. En jaro al mi ne konata tiu bileto de 24 zlotoj estis vendata. La bileto estas 138 x 75 mm kaj presita en verda koloro.




## ***IKUE-KELI***

Memore al la 10a Ekumena Kongreso de 9a–16a de julio 1994 en Gostyn –Pollando, validaj monobiletoj de 500 zlotoj estis neoficiale surpresitaj kun memoriga teksto.



## Bulgario



Por la konstruo de Esperanto-domo en Sofio en la jaroj 1958–1959 la Bulgara Esperantista Asocio vendis brikojn por valoro de unu levo. Preskoloro estas blua, ruĝa kaj verda, formato 40 x 57 mm. (Bildo apude dekstre)

## Aliaj eldonoj

Post la kreo de la stelo-monosistemo de Universala Ligo 1950 aperis poŝtmarkoformaj markoj en stelo-valuto, kies deveno al mi ne estas konata. Iliaj ilustraĵoj malsupre.

1 – **ESPERANTUJO**, 2 spesdekoj, Zamenhof en bruna, la kadro en verda koloro.

2 – **E-poŝto**, ½ de stelo, en verda koloro.

3 – **E-poŝto**, 1 stelo, busto de Zamenhof, ruĝviola (eld. en Kavalkaselle, Italio).

4 – **E-poŝto**, 2 steloj, busto de Zamenhof kiel studento – kreinto de Esperanto.

5 – **Esperanta Ekspozicio**, 10 steloj, verda, bildo de urbo.
















## Fantaziaĵoj

**Princlando de ATLANTIS**

En marto 1993 la gazeto "Stamp Magazine" raportis pri poŝtmarkoj de fantazia "Princlando de Atlantis". La poŝtmarkoj montras skribon "Serĉi - kredi - vidi" kaj valorojn en Esperanto, kiel supozeble ankaŭ monobiletoj, kiujn laŭ raporto en diversaj nominaloj portis en valizo J.L.Mott, danlanda kapitano. En la jaroj 1934–1935 J.L.Mott estis vidata kun poŝtmarkoj kaj monobiletoj de Atlantis, kiujn li vendadis en regiono de Florida kaj Bahamaj Insuloj.













Laŭ alia raporto, grupo da skandinavoj, inter ili esperantistoj, vivis dum la jaroj 1930–1940 sur insuletoj inter Florido kaj Kubo. La centra loko estis Odina. Ili vendis poŝtmarkojn kaj monobiletojn sub la nomo dalo. Unu dalo valoris 100 skalojn aŭ duonon de usona dolaro.

Poŝtmarkojn kaj monobiletojn de Atlantis oni devas konsideri kiel kuriozajn kreaĵojn fantaziajn, same kiel sekvontajn du monobiletojn el Usono.




Dulingva bileto en nominalo de unu milionono (0,000001) de usona cendo memorigas pri la 56a Universala Kongreso de Esperanto en Portland, Usono, en la jaro 1972. Eldonejo estas la societo de amikoj de Benjamin en Houston, en Teŝas.




**"*Esperanto*"** The International Language
Become Bilingual the easy way
Learn To Speak - Read - Write Esperanto
A neutral, non-racial, non-ethnic, non-political language
Make Millions of New Friends Around the World
Esperantists promote Love and Peace in the World
For a FREE postal course or weekly class group

**Call or Write:**
Mayor J. Tilman Williams, Retired
(714) 750-4333 off. (714)750-4344 fax
12291 Harbor Bl., Garden Grove, CA. 92840

Mi estas civitano de la Mondo Kiel Vi
Mia Mondo Estas Via Mondo
Mia Hejmo Estas Via Hejmo
1 1/4 Mile South of Disneyland

Bileto kun nominalo de unu miliono da dolaroj. Dorsflanke estas teksto varba por eklerno de Esperanto (en angla lingvo).

## *Monoŝanĝaj aŭtomatoj*

En pasintaj 10 jaroj multaj bankoj en urbocentroj aŭ turistaj lokoj instalis monoŝanĝajn aŭtomatojn, kiuj ŝanĝas eksterlandajn bankbiletojn. Tian aŭtomaton, kiu informas ankaŭ en Esperanto kaj donas kvitancon en tiu lingvo, mi unuafoje vidis en majo 1992 en flughaveno de Lisbono. Aliaj monoŝanĝaj aŭtomatoj, kiuj donas informon kaj kvitancon en Esperanto, estas antaŭ Kereskedel Banko en Budapeŝto, strato Karoly krt. 20. Ankaŭ en la internacia flughaveno de Basel-Mulhouse, laŭ raporto, ekzistas Esperanto-scia monŝanĝa aŭtomato, kaj en belga urbo Brugge je la centra foira placo tia monŝanĝa aŭtomato antaŭ ASLK-Banko laboras jam dum multaj jaroj.


ASLK BRUGGE-MARKT
MARKT 17 8000 BRUGGE

KERESKEDELMI BANK
Budapest Karoly krt. 20.

BANCO TOTTA & ACORES
AEROPORTO 1281

Trans.: 051330 Dato: 26-11-93 Horo: 13:27

Akceptita bileto: 1.000,00 ESP
Kurzo: 1,226
Kontrauvaloro: 1.220,00 PTE

Elspezita sumo: 1.220,00 PTE

*** Dankon pro via vizito ***

# Mallongaj biografioj de esperantistoj,

**kiuj klopodis realigi Universalan Monosistemon**



***René de Saussure** (1868–1943)*

Denaske li estis franca sviso kaj fariĝis universitata profesoro. Nur dum kelkaj jaroj li estis esperantisto. Lia plej grava verko estas "Fundamentaj reguloj de la vortfarado en Esperanto". En la jaro 1906 li elpensis la spesmilan monosistemon.

Kiam aperis la lingvo IDO, konkurenca al Esperanto, R. de Saussure defendis Esperanton kontraŭ idistaj atakoj. Kelkajn jarojn poste, li mem eksperimentis per novaj lingvaj projektoj: Antido, Lingvo kosmopolita, Esperantido, Nov-Esperanto (1925).

René de Saussure mortis en Berno, 71-jara, en decembro 1943.




***Herbert F. Höveler** (E.Ĉefeĉ; 1859–1918)*

Li naskiĝis en Germanio kaj jam kiel junulo venis al Britio kaj fariĝis brito. Profesie li estis kemiisto kaj metalurgiisto. En la jaro 1904 li konatiĝis kun Esperanto kaj tuj ekkomprenis la utilecon de universala lingvo por la komerco. Li ellernis Esperanton kaj propagandis ĝin per eldono de malgrandaj Esperanto-vortaroj "Ŝlosiloj", kiuj ĝis 1912 aperis en 18 lingvoj. Por faciligi la pagon de internaciaj kontoj por "Ŝlosiloj" kaj aliaj esperantaĵoj li elpensis la sistemon de transpagiloj kaj en septembro 1908 li fondis la Ĉekbankon Esperantistan.

H.F.Höveler mortis en 1918 en Londono.



***Dreves Uitterdijk** (1866–1940)*

D.Uitterdijk [pr.: Ojterdajk] naskiĝis en Roodkerk, Nederlando, kaj esperantiĝis en 1898 kaj baldaŭ fariĝis pioniro de Esperanto-movado en Nederlando. Li verkis la unuan detalan lernolibron por nederlandanoj (1901), fondis gazeton "Holanda Pioniro" (1902) kaj oferis multon da sia tempo, energio kaj mono por la disvastigo de Esperanto. D.Uitterdijk redaktis plurajn E-gazetojn kaj en la jaro 1927 li provis revivigi la spesmilan monosistemon per fondo de Universala Spesmila Banko.

Dreves Uitterdijk mortis en 1940.



***Andreo Cseh** (Ĉe; 1895-1979)*

Li estis denaske hungaro kaj naskiĝis en Transilvanio (en nuna Rumanio). Kun Esperanto li konatiĝis en 1910 kaj post akiro de sufiĉa lingvoscio li fervore propagandis kaj instruis Esperanton. En la jaro 1919 li fariĝis katolika pastro kaj en 1920 li instruis Esperanton al diverslingvuloj en Sibiu. Tie li aplikis netradician rektan instrumetodon sen lernolibroj, pri kiu li poste famiĝis. En 1927 A.Cseh iris al Svedio por instrui Esperanton, en 1928–1929 li gvidis Esperanto-kursojn en Estonio, en 1930 – en Nederlando.

En 1932 en Nederlando A.Cseh komencis redakti kaj eldoni revuon "La Praktiko". Dum la Dua Mondmilito en la jaro 1942 A.Cseh iniciatis en Hago fondon de la "Universala Ligo", kiu post la milito kreis la monunuon Stelo kaj ankaŭ eldonis Esperanto-monerojn.

Andreo Cseh, honora membro de UEA, mortis la 9an de marto 1979 en Hago, Nederlando.

## Resumo

Dum kvar jarmiloj la homaro uzis monon, kiu havis ian realan valoron, kiel greno, bestoj aŭ metalpecoj. Antaŭ ducent jaroj papermono pli kaj pli anstataŭis la metalajn monerojn kaj nun, en komenco de la 3a jarmilo de nia kalendaro, la papermonon forpuŝas kreditkartoj kaj monoĝiroj. Mono fariĝas fikcia kalkulunuo sen garantiata aĉetpovo.

Mono povas plenumi tri diferencajn funkciojn:

1) Ĝi servas por la interŝanĝo de varoj. Tiun taskon plenumas ankaŭ inflacia mono, kies aĉetpova valoro ĉiutage malpliiĝas.

2) Mono estas valormezurilo por kompari la valoron de varoj okaze de interŝanĝo. Tiun kvaliton inflacia mono grandparte perdas.

3) Mono en si mem havas realan valoron kaj taŭgas por konservado kiel arĝentaj aŭ oraj moneroj, kiuj ne povas esti produktataj senlime.

Dum pasintaj 50 jaroj eĉ la plej stabilaj valutoj perdis 75 % da siaj aĉetpovaj valoroj en Svisio, Germanio, Nederlando kaj 90–95 % en Britio, Francio kaj Usono.

La ideo de la Universala Ligo 1976 doni al la Stelo valorstabilecon estis tre bona. Eraro estis fiksi tiun valoron al prezindekso en Amsterdamo, kiu ne havas komparon kun prezoj en najbaraj landoj kaj tute maltrafas komparon en malriĉaj landoj.

Restas la bezono de kompara valorunuo tutmonda. Sed tia devas sin bazi sur tutaĵo de varoj, ĉiutage minimume bezonata de homo, kies valoro estas de ĉiu elkalkulebla. Manipulebla prezindekso farita de pagataj sciencistoj ne taŭgas por komparo.

# INTERNACIA MONA TABELO

**(por aliformigi internacian monvaloron en nacian.)**

**Sm** = Spesmilo, **Sd** = Spesdeko. — 10 Sm = 8 gramoj da oro laŭ proporcio 11/12.

| | Latina Unuiĝo (Frank. Cent.) | Granda Britujo £ | s | d. | Germanujo (Mark. Pfen.) | U. Ŝ. A. (Dolar. Cend.) | Rusujo (Rubloj. Kopek.) | Skandinavia Unuiĝo (Kron. Oeroj.) | Aŭstrujo-Hungarujo (Kron. Heler.) | Portugalujo (Milrejsoj. Rejsoj.) | Holando (Floreoj. Cendoj.) |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| 1 Sd = | 2 1/2 | 0 | 0 | 1/4 | 2 | 1/2 | 1 | 2 | 2 1/2 | 4 1/2 | 1 1/4 |
| 2 » » | 5 | 0 | 0 | 1/2 | 4 | 1 | 2 | 3 3/4 | 5 | 9 | 2 1/2 |
| 3 » » | 7 1/2 | 0 | 0 | 3/4 | 6 | 1 1/2 | 3 | 5 1/2 | 7 | 13 1/2 | 3 3/4 |
| 4 » » | 10 | 0 | 0 | 1 | 8 | 2 | 3 3/4 | 7 1/4 | 9 1/2 | 18 | 4 3/4 |
| 5 » » | 12 1/2 | 0 | 0 | 1 1/4 | 10 | 2 1/2 | 4 3/4 | 9 | 12 | 22 1/2 | 6 |
| 6 » » | 15 | 0 | 0 | 1 1/2 | 12 1/4 | 3 | 5 3/4 | 11 | 14 1/2 | 27 | 7 1/4 |
| 7 » » | 17 1/2 | 0 | 0 | 1 3/4 | 14 1/3 | 3 1/4 | 6 3/4 | 12 3/4 | 17 | 31 1/2 | 8 1/2 |
| 8 » » | 20 | 0 | 0 | 2 | 16 1/3 | 3 3/4 | 7 3/4 | 14 1/2 | 19 1/2 | 36 | 9 3/4 |
| 9 » » | 22 1/2 | 0 | 0 | 2 1/4 | 18 1/2 | 4 1/2 | 8 1/2 | 16 1/2 | 21 1/2 | 40 1/2 | 10 3/4 |
| 10 » » | 25 | 0 | 0 | 2 1/2 | 20 1/2 | 5 | 9 1/2 | 18 1/4 | 24 | 45 | 12 |
| 20 » » | 50 | 0 | 0 | 5 | 41 | 9 3/4 | 19 | 36 1/2 | 48 | 90 | 24 1/4 |
| 30 » » | 76 | 0 | 0 | 7 1/2 | 61 1/2 | 14 3/4 | 28 1/2 | 54 1/2 | 72 | 135 | 36 1/4 |
| 40 » » | 1,01 | 0 | 0 | 10 | 82 | 19 1/2 | 38 | 73 | 96 | 180 1/2 | 48 1/2 |
| 50 » » | 1,26 | 0 | 1 | 0 | 1,02 | 24 1/2 | 47 1/2 | 91 | 1,20 | 225 1/2 | 60 1/2 |
| 60 » » | 1,52 | 0 | 1 | 2 1/2 | 1,23 | 29 1/2 | 57 | 1,09 | 1,44 | 270 1/2 | 72 1/2 |
| 70 » » | 1,77 | 0 | 1 | 5 | 1,43 | 34 | 66 1/4 | 1,27 | 1,65 | 315 1/2 | 84 3/4 |
| 80 » » | 2,02 | 0 | 1 | 7 | 1,64 | 39 | 75 3/4 | 1,45 | 1,92 | 360 1/2 | 96 3/4 |
| 90 » » | 2,27 | 0 | 1 | 9 1/2 | 1,84 | 44 | 85 1/4 | 1,64 | 2,16 | 406 | 1,09 |
| 1 Sm = | 2,53 | 0 | 2 | 0 | 2,05 | 48 3/4 | 95 | 1,82 | 2,40 | 451 | 1,21 |
| 2 » » | 5,05 | 0 | 4 | 0 | 4,10 | 97 1/2 | 1,89 | 3,64 | 4,80 | 902 | 2,42 |
| 3 » » | 7,59 | 0 | 6 | 0 | 6,14 | 1,46 1/4 | 2,84 | 5,46 | 7,20 | 1,358 | 3,63 |
| 4 » » | 10,10 | 0 | 8 | 0 | 8,18 | 1,95 | 3,79 | 7,28 | 9,60 | 1,804 | 4,84 |
| 5 » » | 12,63 | 0 | 10 | 0 | 10,23 | 2,43 3/4 | 4,74 | 9,10 | 12,— | 2,255 | 6,05 |
| 6 » » | 15,16 | 0 | 12 | 0 | 12,27 | 2,92 1/2 | 5,68 | 10,91 | 14,40 | 2,706 | 7,26 |
| 7 » » | 17,68 | 0 | 14 | 0 | 14,32 | 3,41 | 6,63 | 12,73 | 16,80 | 3,157 | 8,47 |
| 8 » » | 20,21 | 0 | 16 | 0 | 16,37 | 3,90 | 7,58 | 14,55 | 19,20 | 3,608 | 9,68 |
| 9 » » | 22,73 | 0 | 18 | 0 | 18,41 | 4,38 1/2 | 8,52 | 16,37 | 21,60 | 4,059 | 10,89 |
| 10 » » | 25,25 | 1 | 0 | 1/4 | 20,46 | 4,87 1/2 | 9,47 | 18,19 | 24,05 | 4,510 | 12,10 |
| 20 » » | 50,52 | 2 | 0 | 1/2 | 40,92 | 9,74 3/4 | 18,94 | 36,38 | 48,10 | 9.021 | 24,20 |
| 30 » » | 75,78 | 3 | 0 | 1 | 61,38 | 14,62 | 28,41 | 54,56 | 72,16 | 13,532 | 36,30 |
| 40 » » | 101,03 | 4 | 0 | 1 | 81,84 | 19,49 | 37,88 | 72,75 | 96,21 | 18,042 | 48,40 |
| 50 » » | 126,30 | 5 | 0 | 1 | 102,30 | 24,37 | 47,35 | 90,94 | 120,26 | 22,553 | 60,50 |
| 60 » » | 151,55 | 6 | 0 | 2 | 122,76 | 29,24 | 56,82 | 109,13 | 144,32 | 27,063 | 72,60 |
| 70 » » | 176,81 | 7 | 0 | 2 | 143,22 | 34,12 | 66,29 | 127,31 | 168,37 | 31,574 | 84,70 |
| 80 » » | 202,07 | 8 | 0 | 2 | 163,68 | 38,99 | 75,76 | 145,50 | 192,42 | 36,084 | 96,80 |
| 90 » » | 227,33 | 9 | 0 | 3 | 184,14 | 43,86 | 85,23 | 163,70 | 216,48 | 40,595 | 108,90 |
| 100 » » | 252,59 | 10 | 0 | 3 | 204,60 | 48,74 | 94,72 | 181,88 | 240,53 | 45,106 | 121,25 |
| 1000 » » | 2525,93 | 100 | 3 | 0 | 2046,— | 487,40 | 947,16 | 1818,78 | 2405,35 | 451,060 | 1212,52 |

# NACIAJ TABELOJ

por aliformigi naciajn monvalorojn en internacian.

## Aŭstrujo-Hungarujo.

| Kronoj | Heleroj | Sm | Sd |
|---|---|---|---|
| | 1 = | | 1/2 |
| | 2 » | | 1 |
| | 3 » | | 1 1/4 |
| | 4 » | | 1 1/2 |
| | 5 » | | 2 |
| | 10 » | | 4 |
| | 15 » | | 6 1/4 |
| | 20 » | | 8 1/4 |
| | 25 » | | 10 1/4 |
| | 30 » | | 12 1/2 |
| | 35 » | | 14 1/2 |
| | 40 » | | 16 3/4 |
| | 45 » | | 18 3/4 |
| | 50 » | | 20 3/4 |
| | 60 » | | 25 |
| | 70 » | | 29 |
| | 80 » | | 33 1/4 |
| | 90 » | | 37 1/2 |
| 1 | = | 41 1/2 | |
| 2 | » | 83 | |
| 3 | » | 1,25 | |
| 4 | » | 1,66 | |
| 5 | » | 2,08 | |
| 10 | » | 4,16 | |
| 15 | » | 6,24 | |
| 20 | » | 8,31 | |
| 25 | » | 10.39 | |
| 30 | » | 12,47 | |
| 35 | » | 14,55 | |
| 40 | » | 16,63 | |
| 45 | » | 18,71 | |
| 50 | » | 20,79 | |
| 60 | » | 24,94 | |
| 70 | » | 29,10 | |
| 80 | » | 33.26 | |
| 90 | » | 37,42 | |
| 100 | » | 41,57 | |
| 1000 | » | 415,73 | |

## Portugalujo.

| Milrejsoj | Rejsoj | Sm | Sd |
|---|---|---|---|
| | 1 = | | 1/4 |
| | 2 » | | 1/2 |
| | 3 » | | 3/4 |
| | 4 » | | 1 |
| | 5 » | | 1 1/4 |
| | 10 » | | 2 1/4 |
| | 15 » | | 3 1/4 |
| | 20 » | | 4 1/2 |
| | 25 » | | 5 1/2 |
| | 30 » | | 6 3/4 |
| | 35 » | | 7 3/4 |
| | 40 » | | 8 3/4 |
| | 45 » | | 10 |
| | 50 » | | 11 |
| | 60 » | | 13 1/4 |
| | 70 » | | 15 1/2 |
| | 80 » | | 17 3/4 |
| | 90 » | | 20 |
| | 100 » | | 22 1/4 |
| | 200 » | | 44 1/4 |
| | 300 » | | 66 1/2 |
| | 400 » | | 88 1/2 |
| | 500 » | 1 | 11 |
| 1 | = | 2,22 | |
| 2 | » | 4,43 | |
| 3 | » | 6,65 | |
| 4 | » | 8,87 | |
| 5 | » | 11.08 | |
| 10 | » | 22,17 | |
| 20 | » | 44.34 | |
| 30 | » | 66,51 | |
| 40 | » | 88.68 | |
| 50 | » | 110,85 | |
| 100 | » | 221,70 | |
| 1000 | » | 2217,— | |

## Holando.

| Florenoj | Censoj | Sm | Sd |
|---|---|---|---|
| | 1 = | | 3/4 |
| | 2 » | | 1 1/2 |
| | 3 » | | 2 1/2 |
| | 4 » | | 3 1/4 |
| | 5 » | | 4 |
| | 10 » | | 8 1/4 |
| | 15 » | | 12 1/4 |
| | 20 » | | 16 1/2 |
| | 25 » | | 20 1/2 |
| | 30 » | | 24 3/4 |
| | 35 » | | 28 3/4 |
| | 40 » | | 33 |
| | 45 » | | 37 |
| | 50 » | | 41 1/4 |
| | 60 » | | 49 1/2 |
| | 70 » | | 57 3/4 |
| | 80 » | | 66 |
| | 90 » | | 74 1/4 |
| 1 | = | 82 1/2 | |
| 2 | » | 1,65 | |
| 3 | » | 2,47 | |
| 4 | » | 3,30 | |
| 5 | » | 4,12 | |
| 10 | » | 8,25 | |
| 15 | » | 12.37 | |
| 20 | » | 16,49 | |
| 25 | » | 20,62 | |
| 30 | » | 24,74 | |
| 35 | » | 28,87 | |
| 40 | » | 33,— | |
| 45 | » | 37,11 | |
| 50 | » | 41.24 | |
| 60 | » | 49,48 | |
| 70 | » | 57,73 | |
| 80 | » | 66,— | |
| 90 | » | 74.23 | |
| 100 | » | 82.47 | |
| 1000 | » | 824,72 | |

# NACIAJ TABELOJ

por aliformigi naciajn monvalorojn en internacian.

## Latina Unuiĝo.

| Frs | Cent | Sm | Sd. |
|---|---|---|---|
| | 1 = | | ½ |
| | 2 » | | 1 |
| | 3 » | | 1 ¼ |
| | 4 » | | 1 ½ |
| | 5 » | | 2 |
| | 10 » | | 4 |
| | 15 » | | 6 |
| | 20 » | | 8 |
| | 25 » | | 10 |
| | 30 » | | 12 |
| | 35 » | | 14 |
| | 40 » | | 16 |
| | 45 » | | 18 |
| | 50 » | | 20 |
| | 60 » | | 24 |
| | 70 » | | 28 |
| | 80 » | | 32 |
| | 90 » | | 36 |

| Frs | | Sm / Sd |
|---|---|---|
| 1 | = | 40 |
| 2 | » | 79 |
| 3 | » | 1.19 |
| 4 | » | 1.58 |
| 5 | » | 1.98 |
| 10 | » | 3.96 |
| 15 | » | 5.94 |
| 20 | » | 7.92 |
| 25 | » | 9.90 |
| 30 | » | 11.88 |
| 35 | » | 13.86 |
| 40 | » | 15.84 |
| 45 | » | 17.82 |
| 50 | » | 19.80 |
| 60 | » | 23.76 |
| 70 | » | 27.72 |
| 80 | » | 31,68 |
| 90 | » | 35.64 |
| 100 | » | 39.59 |
| 1000 | » | 395.89 |

## Granda Britujo.

| £ | s | d | Sm | Sd |
|---|---|---|---|---|
| | | 1 = | | 4 |
| | | 2 » | | 8 ¼ |
| | | 3 » | | 12 ½ |
| | | 4 » | | 16 ½ |
| | | 5 » | | 20 ¾ |
| | | 6 » | | 25 |
| | | 7 » | | 29 |
| | | 8 » | | 33 ¼ |
| | | 9 » | | 37 ½ |
| | | 10 » | | 41 ½ |
| | | 11 » | | 45 ¾ |

| £ | s | | Sm / Sd |
|---|---|---|---|
| | 1 | = | 50 |
| | 2 | » | 1.— |
| | 3 | » | 1,50 |
| | 4 | » | 2.— |
| | 5 | » | 2,50 |
| | 6 | » | 3.— |
| | 7 | » | 3,50 |
| | 8 | » | 4.— |
| | 9 | » | 4.50 |
| | 10 | » | 4.99 |
| | 15 | » | 7.49 |

| £ | | Sm / Sd |
|---|---|---|
| 1 | = | 9.99 |
| 2 | » | 19.97 |
| 3 | » | 29.95 |
| 4 | » | 39.94 |
| 5 | » | 49.92 |
| 6 | » | 59.91 |
| 7 | » | 69.90 |
| 8 | » | 79.88 |
| 9 | » | 89.86 |
| 10 | » | 99.85 |
| 20 | » | 199.70 |
| 30 | » | 299.55 |
| 40 | » | 399.40 |
| 50 | » | 499.25 |
| 60 | » | 599.10 |
| 70 | » | 698.95 |
| 80 | » | 798.80 |
| 90 | » | 898.65 |
| 100 | » | 998.50 |

## Germanujo.

| Markoj | Pfenigoj | Sm | Sd. |
|---|---|---|---|
| | 1 = | | ½ |
| | 2 » | | 1 |
| | 3 » | | 1 ½ |
| | 4 » | | 2 |
| | 5 » | | 2 ½ |
| | 10 » | | 5 |
| | 15 » | | 7 ½ |
| | 20 » | | 10 |
| | 25 » | | 12 |
| | 30 » | | 14 ½ |
| | 35 » | | 17 |
| | 40 » | | 19 ½ |
| | 45 » | | 22 |
| | 50 » | | 24 ½ |
| | 60 » | | 29 ½ |
| | 70 » | | 34 |
| | 80 » | | 39 |
| | 90 » | | 44 |

| Markoj | | Sm / Sd |
|---|---|---|
| 1 | = | 49 |
| 2 | » | 97 ½ |
| 3 | » | 1.47 |
| 4 | » | 1.96 |
| 5 | » | 2.44 |
| 10 | » | 4.89 |
| 15 | » | 7.33 |
| 20 | » | 9.78 |
| 25 | » | 12,22 |
| 30 | » | 14.66 |
| 35 | » | 17.11 |
| 40 | » | 19.55 |
| 45 | » | 22.— |
| 50 | » | 24.44 |
| 60 | » | 29.33 |
| 70 | » | 34.21 |
| 80 | » | 39,12 |
| 90 | » | 44.— |
| 100 | » | 48.88 |
| 1000 | » | 488.76 |

# NACIAJ TABELOJ

por aliformigi naciajn monvalorojn en internacian.

| U. Ŝ. A. | | | | Rusujo. | | | | Skandinavia Unuiĝo. | | | |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| Dolaroj. | Cendoj. | Sm | Sd. | Rubloj. | Kopekoj. | Sm. | Sd. | Kronoj. | Oeroj. | Sm. | Sd. |
| | 1 = | | 2 | | 1 = | | 1 | | 1 = | | 1/2 |
| | 2 » | | 4 | | 2 » | | 2 | | 2 » | | 1 |
| | 3 » | | 6 | | 3 » | | 3 | | 3 » | | 1 1/2 |
| | 4 » | | 8 | | 4 » | | 4 1/4 | | 4 » | | 2 1/4 |
| | 5 » | | 10 1/4 | | 5 » | | 5 1/4 | | 5 » | | 2 3/4 |
| | 10 » | | 20 1/2 | | 10 » | | 10 1/2 | | 10 » | | 5 1/2 |
| | 15 » | | 30 3/4 | | 15 » | | 15 3/4 | | 15 » | | 8 1/4 |
| | 20 » | | 41 | | 20 » | | 21 | | 20 » | | 11 |
| | 25 » | | 51 1/4 | | 25 » | | 26 1/2 | | 25 » | | 13 3/4 |
| | 30 » | | 61 1/2 | | 30 » | | 31 1/2 | | 30 » | | 16 1/2 |
| | 35 » | | 71 3/4 | | 35 » | | 37 | | 35 » | | 19 1/4 |
| | 40 » | | 82 | | 40 » | | 42 1/4 | | 40 » | | 22 |
| | 45 » | | 92 1/4 | | 45 » | | 47 1/2 | | 45 » | | 24 3/4 |
| | 50 » | | 1.02 | | 50 » | | 52 3/4 | | 50 » | | 27 1/2 |
| | 60 » | | 1.23 | | 60 » | | 63 1/4 | | 60 » | | 33 |
| | 70 » | | 1.44 | | 70 » | | 74 | | 70 » | | 38 1/4 |
| | 80 » | | 1.64 | | 80 » | | 84 1/2 | | 80 » | | 44 |
| | 90 » | | 1.85 | | 90 » | | 95 | | 90 » | | 49 1/2 |
| 1 | | = | 2.05 | 1 | | = | 1.06 | 1 | | = | 55 |
| 2 | | » | 4.10 | 2 | | » | 2.11 | 2 | | » | 1.10 |
| 3 | | » | 6.15 | 3 | | » | 3.17 | 3 | | » | 1.65 |
| 4 | | » | 8.21 | 4 | | » | 4.22 | 4 | | » | 2.20 |
| 5 | | » | 10.26 | 5 | | » | 5.28 | 5 | | » | 2.75 |
| 10 | | » | 20.52 | 10 | | » | 10.56 | 10 | | » | 5.50 |
| 15 | | » | 30.78 | 15 | | » | 15.84 | 15 | | » | 8.25 |
| 20 | | » | 41.04 | 20 | | » | 21.12 | 20 | | » | 11.— |
| 25 | | » | 51.29 | 25 | | » | 26.40 | 25 | | » | 13.75 |
| 30 | | » | 61.55 | 30 | | » | 31.68 | 30 | | » | 16.49 |
| 35 | | » | 71.81 | 35 | | » | 36.96 | 35 | | » | 19.24 |
| 40 | | » | 82.07 | 40 | | » | 42.24 | 40 | | » | 22.— |
| 45 | | » | 92.33 | 45 | | » | 47.52 | 45 | | » | 24.74 |
| 50 | | » | 102.59 | 50 | | » | 52.79 | 50 | | » | 27.49 |
| 60 | | » | 123.11 | 60 | | » | 63.35 | 60 | | » | 33.— |
| 70 | | » | 143.62 | 70 | | » | 73.91 | 70 | | » | 38.49 |
| 80 | | » | 164.14 | 80 | | » | 84.47 | 80 | | » | 44 — |
| 90 | | » | 184.66 | 90 | | » | 95.02 | 90 | | » | 49.48 |
| 100 | | » | 205.18 | 100 | | » | 105.58 | 100 | | » | 54.98 |
| 1000 | | » | 2051.75 | 1000 | | » | 1055.78 | 1000 | | » | 549.82 |

# Ĉekbanko Esperantista,

**MERTON ABBEY, LONDON, S.W.**



**"La Spritulo" (al la naciaj monunuoj): Mi havas la honoron, gesinjoroj, prezenti al vi fraŭlinon "Spesmilo"; esperu ni ke via proporcioj al ŝi ŝanceliĝu estonte kiel eble plej malmulte.**

*Desegnaĵo el "La Spritulo" post establo de la Ĉekbanko Esperantista en jaro 1908*


## Kolektantoj

**de Esperantaĵoj, de poŝtmarkoj, poŝtstampoj, tutaĵoj, moneroj kaj glumarkoj,**

**abonu la trimonatan bultenon**

# La Verda Lupeo

Informojn donas: Rolf Beau, Saxoniastr. 35
DE-04451 ALTHEN, Germanio
Retpoŝto: RoBo.ESPERO@t-online.de
Interreto: http://home.t-online/de/home/RoBo.ESPERO





















ISBN 9986-941-49-0